

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 23 n-ro 3 (95) 25.6.1972.
--	---

LA DREW MONUMENTO EN UTO, JAPANIO

(R.A.Lewin, La Jolla, Usono kaj T.Nomra, Misumi, Japanio)*

En Japanio, inter kelkaj algoj kutime manĝataj, estas aparte gravaj kvar specioj de *Porphyra*: *P.tenera*, *P.yezoensis*, *P.pseudolinearis* kaj *P.seriata*. Preskaŭ ĉiu japano, ĉu matene ĉu tagmeze, manĝas iom da norio [= *Porphyra*] ĉiutage. Tamen, tiuj algoj estas sufiĉe multekostaj: la lavita, sekigita preparaĵo, kiun oni nomas norio, kutime kostas po 15 ĝis 25 enojn unu folio je proks. 20x20 centimetroj. Entute, la noria industrio en Japanio buĝetas ĉiujare proksimume 50.000 milionojn da enoj.

Antaŭ 1949., kiam oni jam sufiĉe vaste kultivadis tiujn plantojn sur bambusaj stangoj, rangitaj en taŭgaj intertajdaj lokoj laŭ tradiciaj modoj, la rikoltado de norio estis iom hazarda afero, nekontroleble fluktanta de unu sezono al alia. Tamen en tiu jaro, angla botanikisto, Doktorino Kathleen Drew /Sinjorino Baker/, post daŭra studado de la Eŭropa specio *Porphyra umbilicalis*, malkovris la ne antaŭe suspektitan fakton ke jam konata mikroskopa algo *Conchocelis* /"ĝelmakulanto"/ - sufiĉe ofte trovata boranto en marbordajn konkojn - apartenas al la vivciklo de *Porphyra*. Tiun fakton oni poste pravigis ankaŭ por la japanaj specioj de tiu genro; kaj la plibonigita kono


*) R.A.Lewin, Scripps Institututo de Oceanologio, Universitato de California, LA JOLLA, Calif.

Tad.Nomra, Nishiko-1-ku, Misumi-machi, Kumamoto-ken

de la noria vivociklo - ĉefe, pri la neceso dumvintre kultivi la surŝel-
lan fazon - teknike ebligis pli grandan, pli regulan rikolton de tiuj
dezirataj maralgoj. Sekve, inter la jaroj 1960. kaj 1971. la kvanto da
norio disvendata ĉiujare en Japanio kreskis de 3.500 milionoj ĝis pli
ol 5.000 milionoj da folioj.

Pro tio, la kultivistoj japanaj de la noriplantoj sentis sin tre dan-
kemaj al D-rino Drew; kaj post ŝia morto en 1957. ili konsruigis mo-
numenton por ŝia memorigo, en la urbo Uto, kie la norikultivado estas
finance sufiĉe grava afero /Vidu la mapojn/.

Estas tre malofte, ke oni konstruas memortabulon por Eŭropano en
Japanio. Eĉ pli malofta estas monumento al sciencisto, des pli al viri-
no; kaj preskaŭ unika estas monumento al fikologo /algostudento/. Ti-
al ni fikologoj devus multe fieri pro tiu monumento dediĉita al Drew.
Tamen, estanta ne facile trovebla, ĝi estas nur malofte vizitata, kaj
ankoraŭ nun ĝi estas ĝenerale nekonata eĉ al koncernaj spertuloj. An-
taŭ tiu ĉi jaro, vizitis ĝin eble nur unu ne-japano, D-ro Baker, la angla
vidvo de D-rino Drew.





1



2



3



4

Klarigo pri la bildoj

1. Konkoj de pekto, makulataj per la ŝelboranta algo, *Conchocelis*, la mikroskopa generacio en la vivociklo de *Porphyra* /mara ruĝalgo/. Kontrolata kultivado en vitrodomo; Japanio, 1971.
2. Voĵeto sur la preskinsulon kie oni konstruis la memorigan monumenton de D-rino Kathleen Mary Drew /S-ino Baker/. Urbo Uto, Kumamoto-ken, Japanio; 1971.
3. Monumento memoriganta D-rinon Kathleen Mary Drew /S-inon Baker/. Apude staras D-ro Ralph A. Lewin. Urbo Uto, Kumamoto-ken, Japanio; 1971.
4. Klariga tabulo antaŭ la memoriga monumento de D-rino Kathleen Mary Drew /S-ino Baker/. Dekstre staras S-ro Tadcuna Nomra. Urbo Uto, Kumamoto-ken, Japanio; 1971.

Ĉar tia monumento indas pli da diskono, almenaŭ inter la fikologoj tutmondaj, ni prezentas ĉi tie fotografaĵojn faritajn dum la pasinta somero - okaze de la Sepa /en Japanio la unua/ Internacia Kongreso pri Maralgaj Studoj - kaj mapojn kiuj eble helpos al tiuj interesatoj kiuj estontece deziros viziti ĝin.

Sur la monumento troviĝas la tekstoj:

anglalingve: "In memory of Madame Kathleen Mary Drew, D.Sc., Mrs Wright Baker /6-XI-1901 - 14-IX-1957/ ; research fellow in the University of Manchester, England; discoverer of the Conchocelis phase of Porphyra. Erected in 1963."

japanlingve: /tradukite en Esperanton/: "S-rino Kathleen Mary Drew /naskita la 6an de novembro, 1901., kaj mortinta la 14an de septembro, 1959./; botanikistino de la Universitato de Manchester, Britujo; trovinto de la Conchocelis-fazo de norio. Konstruita en la jaro 1963." Plue, sur la dorso de la monumento troviĝas tiuj ĉi klariĝaj rimarkoj: "Sinjorino Drew /edzino de Profesoro Baker/, unuaranga fikologo de Britio, kiu publikigis multajn elstarajn studoverkojn pri la vivocikloj de ruĝaj algoj, eltrovis la filamentan Conchocelis-fazon de norio en la jaro 1949. La nuntempa prospero de la nori-industrio en nia lando ŝuldas sian progreson al la kontrolata kultivado kiun ebligis ŝia eltrovo. Oni povas titoli ŝin "la patroninon de la nori-industrio". Por agnoski ŝian meriton kaj virton ni konstruis ĉi tiun monumenton."

+

+ +

/Parenteze, por unu el ni verkintoj, R.A.L., tia vizito al la Drew monumento estis ebla nur ĉar la alia, T.N., tiel bone konas la lokon, kaj ĉar ni ambaŭ konas la internacian lingvon. R.A.L. estas anglo, T.N. japano; ne konantaj la nacian lingvon unu de la alia, ni interkonatiĝis, kaj nepre paroladas kaj korespondadas nur per Esperanto./